

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Aŭtuna promeno
Sadretdinova Naila
[Voroneĵ, Rusio]

2002

Kiel Anatolij Ionesov, iniciatinto de "Aŭtografo de Paco" iĝis komencanto — literatur-historiaj paĝoj — raporto el Kosovo — originala prozo — por gajaj instruantoj kaj scivolemaj lernantoj — neelpensitaj historioj — tempo kaj homoj — aforismoj — anekdotoj — invitoj kaj informoj — korespondu!

5

Perantoj de KOMENCANTO

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strŕznice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ermits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuressaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Viŝnja
Brankoviĉ, Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugalio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum pl 455, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Bildo de foriranta aŭtuno de *Naila Sadretdinova* renkontas vin sur la kovrilo de la 5-a numero.

En la rubriko "Kiel tio komenciĝis" *Anatolij Ionesov*, fondinto kaj direktoro de la "Muzeo de Paco" kaj la iniciatoro de la projekto "Aŭtografo de Paco" el Samarkando, Uzbekistano, rakontas pri sia esperantistiĝo kaj siaj atingoj.

Sur la literatur-historiaj paĝoj vin atendas rakonto pri neordinara persono, homo, kiu fondis E-organizon SAT kaj iniciatis eldonon de la "Plena Vortaro de Esperanto" — *Eŭgeno Lanti*.

Ni daŭrigas serion de ekskluzivaj raportoj el Kosovo, kie servas kiel Internacia Policisto nia leganto el Germanio *Jürgen Klokner*.

Ĉe la najbara paĝo vi trovos kaj post la traĝego povos mem pritaksi du iom filozofiecajn originalajn rakontojn de niaj kontribuantoj *Popov Nikolaj*, Rusio kaj *Petrov Maksim* el Kazahio.

Plue sekvas gramatika rubriko "Por gajaj instruantoj kaj scivolemaj lernantoj" kaj kolekto de neelpensitaj historioj, kiujn alsendis niaj legantoj el diversaj anguloj de la lando.

Sub la temo "Tempo kaj homo" ĉi-foje ni publikigas scienc-fician rakonton de nia nova aŭtoro el Usono *Stephen Morgana* kaj saĝajn pensojn pri "Tempo kaj oportuno", tradukitajn de nia leganto el Brazilo *Jader Rodrigues da Silva*.

Kiel ĉiam vin distros anekdotoj kaj aforismoj. En ĉi-tiu numero vi trovos ankaŭ la teston pri Zamenhof, kiun ni proponas rilate al la proksimiĝanta naskiĝdato de nia Majstro kaj petas vin aktive sendi al la redakcio viajn respondojn al tiu testo.

Ĉe la 15-a paĝo estas oficialaĵoj kaj bildeto de nia nova pentristino *Daŝa Dalmatova*, Rusio. *J. Tilman Williams* el Usono invitas vin al "Oazo de Esperanto" de sur la dorsa kovrilpaĝo.

Karaj amikoj! Komenciĝas abonkampanjo por KOMENCANTO-2003. Ni tre esperas, ke nia revuo estis interesa kaj utila por vi en la nuna jaro kaj estonte vi ankaŭ restos ĝia fidela leganto. Niaflanke ni klopodos, ke la legado de nia revuo donu al vi nur la pozitivajn emociojn!

Agrablan legadon!

KOMENCANTO

2002 numero 5 // (37) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2003:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orienscŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 120 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

La sola kondiĉo - nepre menci **KOMENCANTO**'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Kiel tio komenciĝis

Anatolij Ionesov

Elstara E-aktivulo. Fondinto kaj direktoro de la Muzeo de Paco kaj Solidaro en Samarkando, Uzbekistano; 1994-97 - membro de la konsilio de Internacia Paca Buroo en Ĝenevo.



Naskiĝis la 1-an de aŭgusto 1956 en Samarkando. Esperanton ekstudis koresponde en la jaroj 1976-77. Finis la fremdlingvan fakultaton de Samarkanda Ŝtata Universitato, fakon pri la angla lingvo kaj literaturo.

Diplomita filologo, angla-lingva instruisto, diplomigis pri la esperantologia temo: "Kelkaj specifaj trajtoj de la angla kaj Esperanta frazeologioj". En oktobro 1977 iniciatis fondon de la unua en Samarkando (almenaŭ post la dua mondmilito!) Esperanto-klubo subtitole "Klubo de Internacia Amikeco "Esperanto" kaj fariĝis ties unua prezidanto. Estis iniciinto kaj dum pluraj jaroj ĉefa organizanto de la Uzbekiaj Esperanto - Renkontiĝoj (UzER) kaj de la universitat-nivelaj Studentaj sciencaj konferencoj pri interlingvistiko kaj esperantologio en Samarkando.

En decembro 1986, helpate de lokaj E-aktivuloj, fondis la Internacian Muzeon de Paco kaj Solidaro en Samarkando. La muzeo estas distingita de la Ministerio pri kulturaj aferoj de Uzbekistano kaj nun ĝi portas la honoran titolon "Popola Muzeo". Detala priskribo de la muzeo aperis en la libro "Peace Museums Worldwide" ("Pacmuzeoj Tutmonde") publikigita de la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo (p. 3-4, 7-14, 77). En la projekto de la muzeo "Aŭtografo de Paco" partoprenas multaj mondaj eminentuloj (interalie ŝtatestroj, elstaraj verkistoj, poetoj, artistoj, astro-naŭtoj, sciencistoj, Nobelpremiitoj ktp). Dum la jaroj 1988-90 profesie laboris kiel respondeca sekretario de la Samarkand-provinca fondaĵo de kulturo. 1994-97 - membro de la konsilio de Internacia Paca Buroo en Ĝenevo. De pluraj jaroj - membro kaj delegito de UEA, landa reprezentanto de "Monda Turismo", "Pasporta servo". 1988 -

...mi opiniis (kaj ĝis nun kredas!), ke la plej bona kaj efika propagando de Esperanto estas aplikado de la lingvo en diversaj medioj, konkretaj soci-utilaj faroj de esperantistoj.

kunaŭtoris la unuan uzbeklingvan esperantan studlibron subtitole "Esperanto Xalqaro Tili".


Mia unua konatiĝo kun Esperanto okazis en la jaro 1976 en ...armeodum mia soldata servo. Mi armeiĝis fininte du studjarojn de la fremdlingva fakultato de la universitato. Tiutempe, estante soldato, por iom praktiki kaj ne forgesi la anglan, mi korespondis anglalingve kun gejunuloj en diversaj anguloj de USSR. Inter miaj plumamikoj estis ankaŭ studentino el Krasnojarsko, kies nomo estis Galina Oshmarova. Foje mi ricevis la leteron, en kiu Galina skribis, ke ŝi ekstudis Esperanton. Komence mi ne interesiĝis pri la afero, sed en unu en sekvintaj leteroj ŝi rakontis, ke post kelkaj monatoj ŝi sukcese finis E-kurson kaj partoprenis en la Balta Esperanto-Tendaro, kiu ege plezurigis ŝin. Responde mi petis ŝin sendi al mi esplorcele E-lemolibron. Galina respondis, ke ŝi ne posedas lemolibron, sed indikis la adreson de koresponda E-kurso de Boris Kolker (en urbo Ufa, Baŝkirio - la red.). Do, mi skribis al Ufa, tamen evidentiĝis, ke tiumomente pro multaj aliĝintoj tie oni ne plu akceptis novajn kursanojn kaj oni direktis min al E-klubo en urbo Salavat (ankaŭ en Baŝkirio), kiu tiutempe prizorgis similan korespondan E-kurson. Post mia aliĝo, oni tuj sendis al mi la lemolibron kaj komenciĝis mia studado en nefacilaj armeaj kondiĉoj. Mia aktivado en la movado startis jam en mia milita taĉmento. Studante la lingvon koresponde, samtempe mi komencis popularigi ĝin inter miaj samtaĉmentanoj - soldatoj kaj oficiroj. Mi prelegis pri Esperanto kaj eĉ kun mia amiko preparis kaj surmurigis en la kazerno belan tiuteman anoncon. Deko da personoj, inter ili unu oficiro, ekinteresiĝis kaj sub mia kuraĝigo kaj prizorgo ili ĉiuj grupe aliĝis al la koresponda E-kurso de Boris Kolker. Samizdata E-bulteno "Kurte", kiu tiutempe cirkuliĝis tra la tuta lando, raportis: "Soldato el Gusinoozjorsk A. Ionesov prelegis pri Esperanto en sia milita taĉmento".

Sufiĉe diligente mi studis la lingvon internacian, ne vidinte eĉ unu vivantan esperantiston, nek spertinte aŭdi Esperantan parolon. Post kelkaj monatoj mi finis tiun kurson kaj miaj korespondaj instruistoj konsilis al mi partopreni en iu junulara E-tendaro. Mia soldata servo proksimiĝis al la fino kaj reveninte hejmen en majo 1977, post kelktempa meditado, mi aliĝis al OrSEJT-19 (Orient-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro) kaj ekveturis al la lago Turgojak apud la urbo Miass en Uralo.

Kiam mi atingis la lagon jam krepuskiĝis kaj inter multenombraj turistaj bazejoj ne estis facile trovi la esperantistan tendaron. Je mia demando "Ĉu estas ĉi tie esperantistoj?" kutime sekvis respondo "ne!". Preskaŭ malesperinte, finfine bonŝance mi ekaŭdis iujn E-parolantojn kiuj alkuris al mi kaj komencis ion flue paroli en Esperanto. Verdire mi ne multon komprenis kaj respondis al ili, ke mi ĵus venis lacigita kaj ke ni ekparolu Esperanton morgaŭ matene. En la tendaro mi konatiĝis kun kelkaj tiamaj kaj postaj E- eminentuloj kiel Boris Kolker, Eugeno Perevertajlo, Alck-sander Korjenkov...

Reveninte hejmen, mi tuj komencis allogi al Esperanto miajn samuniversitatajn, unuavice el la fremdlingva fakultato, kie mi daŭrigis miajn studojn. Samjare la 1-an de oktobro mi iniciatis fondon de Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco ĉe la urba komitato de komsomolo. Tiutempe tio estis tre bona tegmento por E-aktivado. Samtempe mi ĉiele klopodis laŭpove enpenetriĝi Esperanton en miajn universitatajn studojn kaj en tiujn de miaj kolegoj.


En la fakultato ni preparis grandan kelkmetran priesperantan murgazeton, komenciĝis priesperantaj prelegoj, ĉe la studenta scienca societo fondiĝis sekcio pri interlingvistiko kaj esperantologio. >>>



A. Ionesov: Kiel mi esperantistiĝis (fino)

Ekde komenco mi opiniis (kaj ĝis nun kredas!), ke la plej bona kaj efika propagando de Esperanto estas aplikado de la lingvo en diversaj medioj, konkretaj soci-utilaj faroj de esperantistoj. Dum jaroj tiu ĉi klubo fariĝis unu el la plej aktivaj en la tuta lando, ĝi ekhavis bonan reputacion ankaŭ ekstermovade. Estis organizitaj multegaj sukcesaj iniciatoj kiel E-kursoj, E-fakultativoj en lernejoj, diversaj internaciaj ekspozicioj, studentaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj konferencoj, universitatnivela diplomigo pri esperantologiaj temoj, UzEROj (Uzbekiaj E-renkontigoj), E-muzik-grupo "Amiko", diversaj priesperantaj broŝuroj ktp. Ni kunvenadis kutime ĉiusabate en plej diversaj lokoj, kiel palaco de pioniroj, regiona biblioteko, urba parko... Dum perestrojko naskiĝis ideo surbaze de tiu ĉi E-klubo kaj ties kolekto fondi la Internacian Muzeon de Paco kaj Solidaro.

Tiun ĉi projekton mi sukcesis realigi, kune kun miaj kolegoj, la 31-an de decembro 1986, kiam okazis ties inaŭguro en la centra urba parko de Samarkando. Tio estis nova etapo de mia vivo kaj E-agado. La muzeo fakte fariĝis ankaŭ E-klubejo, renkontiĝejo kun alilandaj gastoj vizitantaj la urbon. Ĉiuj vizitantoj de la muzeo nepre informiĝas ankaŭ pri Esperanto. Multaj miras, ke la muzeo estis organizita kaj prizorgata de lokaj E-aktivuloj. Dum ekstermovadaj internaciaj konferencoj kaj seminarioj, kien de tempo al tempo estas invitata nia Pacmuzeo, tie plej ofte mi estas sola esperantisto, kaj kompreneble mi klopodas senaltrude prezenti ankaŭ Esperanton kaj ties gravan kulturproksimigan, amikigan kaj pacigan rolon en la nuntempa mondo. Verdire mi ne multe "videblas" en la internacia movado, ekzemple, bedaŭrinde mi ĝis nun neniam sukcesis ĉeesti la Universalajn Kongresojn, kvankam mi certe tenas pulson de la Esperantio legante E-revuojn, korespondante kun diverslandaj movadanoj... Ĉi-loke mi ne povas ne mencii E-aktivulojn kun kiuj mi havis feliĉon kunlabori por kaj per Esperanto: taŝkentanoj Petro Polišĉuk, Kutlukhan Ŝakirov, Eugeno Perevertajlo, Vladimir Masalkin kaj samarkandanoj Vladimir Lemelev, Ŝavkat Hamrakulov, Rafija Jafasova, Bahodir Habibov, Vladimir Ŝotkin, Ĝuzal Badamŝina kaj multaj multaj aliaj...



En la muzeo

La dua periodo de esperanta literaturo

Karaj legantoj!

Daŭrigante la prilumon de la dua literatur-historia periodo, ĉi-foje ni rakontos al vi pri la vivo kaj agado de ankoraŭ unu esperanta verkisto kaj eksterordinara persono, pri Eŭgeno Lanti.

Eŭgeno Lanti estas unu el la fundamentanoj de Esperantomovado, sian tutan vivon li plene dediĉis al senlaca kaj senĉesa Esperanto-agado. Lia vera nomo estis Eŭgeno Adam, poste li famiĝos sub la pseŭdonimo Eŭgeno Lanti.

Li naskiĝis la 19-a de julio 1879 en farmista familio en malgranda franca vilaĝeto Néhou. Dum la infaneco al Eŭgeno profunde influis libro, kiun li tralegis ankoraŭ en la elementa lernejo "Rondmigrado de du knaboj tra Francujo". Lin ankaŭ allogis novaj nekonataj lokoj. Post finvizitado de la lernejo Eŭgeno deklaris sian deziron lemi metion en la apuda urbeto ĉe lignaĵista majstro. Poste li finis kurson, kiu preparis instruistojn por la fako de meblodesegnado kaj post sia diplomigo iĝis fakinstruisto pri manlaboro kaj geometria desegnado.

Dum la juneco ankaŭ profunde influis lin socipolitikaj teorioj de Henry Ner, kiu estis sendependa filozofo kun liberecanaj ideoj kaj de kiu Eŭgeno transprenis anarkiistan mondrigardon. Li multe legadis anarkiistan literaturon, inter kiu lin pli impresis verkoj de Bakunin, Kropotkin, Reclus k.a. "Adam alproprigis al si la ideojn de la diversaj anarkiistoj kaj forĝis el tiu idearo sian bildon de alstrebenda socio. Rilate la nacion, li plene aprobis ĝenerale agnoskitan principon de la anarkiistoj "For ĉiujn naciojn kaj ĉian naciismon", — skribis E. Borsboom (en la biografia verko "Vivo de Lanti").

Sed la sinteno de la anarkiistoj dum la unua mondmilito, — kiam eminentaj liberecanoj, kiuj antaŭe anoncis sian nepartoprenon en iu agado, nacie respektanta, subite partoprenis la militon, — forskuis la anarkiistan kredon de Adam.

Dum la unua mondmilito li estis mobilizita kaj kvar jarojn militservadis en ambulanco kiel flegisto. Ĉi tie ni prezentas fragmenton el la biografia verko "Vivo de Lanti", kie estas bone priskribita unu el la epizodoj de dum milita vivo de Eŭgeno Lanti.

"...En septembro 1914 estis transportitaj unufoje germanaj vunditoj en la lazareton, kie Adam deĝoris. Ĉiuj flegistoj manifestis grandan helpemon kaj kompaton al la francaj vunditoj kaj ignoron por la samtempemportitaj germanoj. Sola, Adam deklaris, ke li prizorgas ilin. Alpreno de tiu sinteno elĉenigis la furiozon de la ceteraj flegistoj, kiuj ne povis toleri tian "favoron" al la malamikoj. Malgraŭ minaco kaj riproĉo de kelkaj oficiroj Adam persistis kaj sukcesis, parte pro helpo de lin defendanta kuracisto kaj Lecomte. Sed kion li rikoltis? La germanoj nenion komprenis pri la sinteno de sia flegisto kaj rigardis kun pli da malfidego lin ol la aliajn francajn sanitaristojn. Amika gesto de franco al germano, eĉ se tiu suferis, kia absurdaĵo! Ili fordeturnis sin de la danĝerulo. Tia travivaĵo restadis antaŭ la okuloj de Adam ankoraŭ longjare post la militĉeso kaj firmigis lian naŭzon kontraŭ ĉio nacieca."

Fine de novembro 1918, reveninte de la fronto kaj fariĝinte tre skeptika pri anarkiismo, Eŭgeno ekdediĉis sin al la mondlingva movado. Ankoraŭ dum militaj jaroj li lernis Esperanton, iom poste li ankaŭ ekinteresiĝis pri la konkuranto de Esperanto, artefarita lingvo Ido. En 1919 li ankoraŭ hezitis, ĉu aliĝi al Esperanto aŭ al Ido, fine decidis por Esperanto.

Tiutempe laboristaj esperantistoj en Parizo klopodis restarigi la movadon, E. Lanti ankaŭ aktive aliĝis al ili kaj oni proponis al li taskon de redaktoro de la noveldonota "Le Travailleur Esperantiste", kiu poste transformiĝis en "Laborista esperantisto". Kune kun esperantistoj L. Bannier, L. Glodeau li restarigis la antaŭmilitan asocion "Liberiga Stelo", el kiu en 1921 naskiĝis "Sennacieca Asocio Tutmonda" (SAT). Tio estis granda evento por tiuj tempoj kaj signifis kreon de aparta, memstara proletmovado, sendependa de la neŭtrala. Oni nomis tiun eventon — la historia misio de la SAT-fondinto Eŭgeno Lanti.

Ĉi-tiun organizon Lanti gvidis ĝis 1933 kaj montris ĉe tio eksterordinaran kapablon, plenumante malfacilan taskon kunlaborigi diverstendencanojn en unu organizo. Daŭran atenton Lanti devis dediĉi al la psikologia milito kun liaj kontraŭuloj. Lia laborpovo estis senkompara: li redaktis aŭ gvidis la redaktadon de multaj E-periodaĵoj — "Sennacieca revuo", "Sennaciulo", "La Nova Epoko"; verkis multnombrajn artikolojn kaj broŝurojn, inter kiuj: "For la Neŭtralismo" (1922), "La Laborista Esperantismo" (1928, ĝi estis kvazaŭ programo de SAT-movado), "Naciismo" (studo pri deveno, evoluado kaj sekvoj, 1930), "Vortoj de kamarado Lanti", (kolekto de artikoloj; 1931), "Manifesto de sennacianoj" (1932).

Lanti aprecis literaturon, li intense okupiĝis pri ĝi. Favoraj aŭtoroj estis Barbusse, Rollan, Ner, Nietzsche kun la sociolitikaj linioj en liaj verkoj. Apartan ĝuon li spertis ĉe Rabelais kaj Voltaire. Ĉe Rabelais lin precipe inspiris ties vivmaniero, iom paralela al la lia. Ambaŭ, Rabelais kaj Lanti, montris herezulajn trajtojn, kritikante la ekzistantan socion. Ambaŭ skizis elementojn por estonta ideala ŝtato, tuŝante problemojn pri anarkiema regado kaj artefarita lingvo. Ambaŭ kree riĉigis sian lingvon.

Voltaire kaptis admiron de Lanti pro sia akra lango — ankaŭ mem Lanti scipovis tranĉile polemiki. Li tradukis tri verkojn de Voltaire: "Kandid" en 1929, "Senartifikulon" kaj "Zadig" en 1941.

El aliaj tradukoj de E. Lanti estas konataj "La konflikto" de Dantec (1929), "La veraj interparoloj de Sokrato" de Henry Ner (1944). Ambaŭ ili estas filozofecaj verkoj.

En decembro 1939 li komencis verki aŭtobiografian romanon. Instigis lin la legado de "Karlo" de Privat. Do-maĝe, ke malsano de Lanti ĉesigis tiun ĉi verkadon kaj la 122 manuskriptaj paĝoj restis kiel fragmento.

Eŭgeno Lanti havis majstran lingvo-nivelon kaj stilon. Grosjean-Maŭpin skribis: "Pri la stilo mi mallonge diras, ke ĝi estas ne nur konstante korekta, sed ankaŭ rimarkinde klara, preciza, flua, fleksebla kaj facilmovata, unuvorte vere modela kaj imitinda".

Tia verkisto certe sentegis la neeston de komuna vortaro Esperanto-esperanta, Lanti iniciatis la eldonon de tia vortaro kaj iĝis ties organizanto. Baldaŭ formiĝis grupo el Grosjean-Maŭpin, Waringhien, kiuj komencis la laboron. Lanti senlace vartis la entreprenon: li kundiskutis pri ĝeneralaj trajtoj de la verko, solvis sennombrajn demandojn pri tipografio kaj kontrollegis ĉiun presfolion. Fine en 1930 naskiĝis monumenta verko "Plena Vortaro de Esperanto".

En la 1935 oni povas konstati krian periodon en la vivo de Lanti.

"Liaj flugiloj parafiziĝis... La krizo malkaŝis sin en la daŭra manko de novaj ideoj, malpliigo de energio por iniciati ion, kaj naŭzo kontraŭ fare de francaj bolŝevistoj entreprenita venenado de la laborista Esperanto-klubo en Parizo mem. Tiu ĉi fuŝo inter la ĉiam relative unueca amikaro dolorige emociis Lanti... La aĉan atmosferon Lanti ne plu volas elteni, li volas for, denove trovi lokon kie regas akordo. Kial ne difinitive forlasi Parizon? Ĝuste en tiuj tagoj la franca registaro dekretis, ke ĝi malaltigos la budĝeton de instruado kaj intencas emeritiĝi certan kvanton el la instruistoj... Tial, ke Lanti neniam konsideris sian profesion laboron kiel feliĉigan vivotaskon, kaj nun bezonegis freŝan aeron, por reakiri inspiradon, li decidis elekti la pensian stacion. Forlasi la lernejon kaj forlasi la landon por praktike fariĝi sennaciulo. Adiaŭ, ĉiu kaj ĉio konata!.. Adiaŭ laste kaj plej dolore al sia kara kreitaĵo, sia ido SAT. Lanti intencis senbrue neatendite forvojaĝi, tiel evitante la organizitan festenon, en kiu kelkaj amikoj kaj konatoj volis salute premi lian manon. Li ne aperis kaj la sekvantan matenon frue forlasis Parizon." [el "Vivo de Lanti"]

La unua SAT-ano antaŭ ĉio intencis realigi la sloganon, kiun li mem ĉe la komenco de SAT laŭtigis: "SAT-anoj kutimiĝu al ekstermacia sent,—pens,— kaj agadkapablo."

Li veturis al Japanio kun la intenco loĝadi tie dum longa tempo. Tiu lando allogis lin pro sia delikata kulturo, pratempe tradicioj rilate la socian vivon, kaj misterplena religieco kaj filozofieco.

Bedaŭrinde, travivinte en tiu lando ĉirkaŭ unu jaro kaj duono, li devis forlasi ĝin kun konstato, ke ne trovis tie tion, kion serĉis lia animo. Plejparte li vivis en Japanio sufiĉe izolite, konstanta polica gardo ne permesis bezonajn kontaktojn kun esperantistoj; lin ĝenis ankoraŭ la penso, ke ĝuste en la lando kun densa Esperanto-movado li nenion povis fari por la propagando de la lingvo kaj la SAT-movado. Lia ĝenerala kono pri la lando kaj popolo sufiĉe satiĝis kaj li do forvojaĝis Aŭstralion, de kie ricevis inviton de esperantisto John Eliot.

Dekomence li loĝis en Sidnejo en familio de J. Eliot, poste translokiĝis al Melburno, kie loĝis en hejmo de esperantistino Anna Hintze. Ĝuste en tiu tempo li suferis de vica terura atako de la danĝera malsano, kiu aperis ĉe li ankoraŭ en Japanio en 1937. Anna Hintze bonkore kaj plendediĉe flegis Eŭgenon dum la tuta tempo de malsano. Iom malpli ol unu jaro vivis Lanti en Aŭstralio. La lando severe regulis la enmigradon kaj la unua sennaciulo akiris nur turistan vizon, ebligantan resti en la lando mallongan periodon. Krome vivokosto en tiu ĉi lando estis sufiĉe alta



Eŭgeno Lanti, 1922

por Lanti. Tial li planis instali sin en iu malkara ŝtato, prefere en Latin-Ameriko. Sed antaŭ ol veturi tien li ŝatis vidi Novzelandon kaj vojaĝis tien.

La duonjaro, pasigita en Novzelando iĝis la agrabla tempopeco en la vivo de Lanti. Ĉi tie oni taksis la mondvojaĝanton ĝustmaniere, vidante en li eminentan esperantiston kaj eksterordinaran personon. Ĉirkaŭ Lanti ofte kolektiĝis rondoj de esperantistoj, kiuj ĝis malfrue en la nokto diskutis en lia ĉambro pri diversaj movadaj temoj. En tia plaĉa medio Lanti kapablis efike varbi por SAT. Tamen, malgraŭ ĉio pozitiva en tiu ĉi lando, altkosta nivelo de la vivo ĉi-tie devigis Eŭgenon lasi Novzelandon kaj translokiĝi al Argentino. Post Argentino sekvis Ĉilio, kie li vivis dum unu jaro. Sed Lanti ne povis trovi ie ajn trankvilon kaj iĝis vera planedulo.


Meksikio iĝis la lasta loko de lia ĉeestado en tiu ĉi mondo. Ĉi tie li vivis dum 7 jaroj, de decembro 1940 ĝis la januaro 1947, dum kiuj li daŭris aktivi en la movado kaj propagandi Esperanton, "senlace plugante terenon ĉie kaj ĉie". Li trifoje paroladis en radiostacio de Meksikio, verkis multajn artikolojn por diversaj E-periodaĵoj, renkontiĝis kun lokaj kaj aktive korespondadis kun foraj esperantistoj. Li volis nepre utiligi Esperanton, dirante: "Nia lingvo estas ilo de la ago."

Dum la lastaj jaroj de lia vivo E. Lanti tro suferis pro krudaj atakoj de akirinta en Japanio malsano. Fine de 1946 aperis nova, pli kruela simptomo — absceso en la kapo, kiu kaŭzis akrajn turmentojn kaj netolereblan kapdolorigon ĉe li. Ĉio tio devigis lin pli kaj pli ofte pensi pri memmortigo. Fine, la 17-an de januaro 1947, li sufokis sin nokte, restigite la testamentan leteron.

Tiel tragedie finiĝis malproksime de lia patrujo Francio vivo de la unua sennaciulo Eŭgeno Lanti.

En Kosovo – parto 3

Jürgen Kloker
Internacia germana policisto por la servo de la
Unuiĝintaj Nacioj



Belega kafejo ĉe la „Batlava-Lago” en la nordo de Kosovo

Dum sekvaj du semajnoj ni ofte eskortis serbajn advokatojn al juĝejo en Prizren. Tie oni traktis murdo-kazon. La procezon gvidis internaciaj juĝistoj kaj prokuroro. Je la fino de la lasta tago ĉiuj estis scivolemaj pri la verdikto. Kaj estis feliĉo por la serba akuzito, li estis senkulpa. Ni kaj la advokato rapide forlasis la juĝejon pro nia sekureco, same la akuzito kun liaj gardistoj, ĉar la aŭskultantoj jam iĝis violentaj.

Dum la diversaj debatoj mi konsciis, ke la polica laboro en diversaj landoj estas diversa. La eŭropanoj agas iom alimaniere ol la usonanoj kaj ambaŭ tute alie ol la azianoj aŭ afrikanoj. Sed kion fari, en Kosovo oni bezonas multe da Internaciaj Policistoj, tial oni ankaŭ devas estimi aliajn „morojn“. Sed akcepti tion estas precipe por eŭropanoj malfacile.

Post paŭzo de unu tago atendis min alia tasko: veturi al tri diversaj vilaĝoj en la nordo de Kosovo por akcepti en vilaĝoj homojn kaj veturigi ilin al Mitrovica por renkontiĝo al loka UN-sidejo. [UN — Unuiĝintaj Nacioj]


Pro tiu tasko ni uzis la „Monster Truck“, ĉar ni devis veturigi naŭ serbajn homojn. Ni startis je la kvina kaj post unu horo ni atingis ĝustatempe la unuan vilaĝon. Ni atendis antaŭ la vilaĝa administrejo. Sed la unuaj du homoj ne estis tie.

Post dudek minutoj ni demandis unu vilaĝanon. Li respondis, ke li konas tiujn du homojn kaj povus montri al ni la koncernajn loĝejojn. Sed ni rifuzis, ĉar en la papera ordono estis tute klare skribita „renkontejo: vilaĝa administrejo“. Post tridekminuta atendado ni pluveturis al la dua vilaĝo. Post dek minuta malfruiĝo ni atingis la duan vilaĝon proksime de la urbo Kamenica. Anstataŭ du personoj tie nin ankaŭ atendis nur unu viro. Ni atendis aliajn ankoraŭ dum kelkaj minutoj kaj fine pluveturis kun unu persono al la serba vilaĝo Gračanica. La vojo al la tria vilaĝo estis terura. Ni veturis tra la montoj sur ege malbonaj stratoj. An-

kaŭ en Gračanica nin atendis nur du homoj. Neniu sciis ion pri la aliaj. Anstataŭ naŭ ni eskortis nur tri personojn. Ni ne sciis, kial la aliaj ne venis. Eble ili sciis nenion pri la renkontiĝo aŭ eble ili estis timemaj. Ĉar estas ankoraŭ danĝere veturi tra Kosovo se vi estas serbo. Mitrovica estas aparta urbo, situanta en la nordo de Kosovo. Mitrovica estas du-partigita: en la norda parto loĝas serboj kaj en la suda — albanoj, meze fluas la rivero „Ibar“ kiu estas la limo. La pontoj estas gardigataj de KFOR-soldatoj. Ofte estas demonstracioj en Mitrovica kaj estas ankoraŭ foj-foje limtrairoj. Iam estis demonstracio kaj pola policisto estis grave vundita per man-grenado.

La UN-sidejo estis apud la rivero „Ibar“ en la suda parto. Ni parkis nian „Monster Truck“ kaj rigardis al la ĉefa ponto. Post tri horoj da atendado subite veturis polictankoj kaj policistoj de speciala anti-perforta taĉmento. Tiu taĉmento estis de Hindio. Mi vidis germanan kolegon kaj demandis lin, kio okazas tie? Li respondis ke policistoj arestis hieraŭ serban krimulon kaj nun oni ne scias, ĉu liaj serbaj amikoj ĉi-kaŭze demonstracias? Sed oni volas esti pretaj por ĉiu kazo. Kaj precipe tiu ĉi ponto esta danĝera loko. Sed finfine nenio okazis kaj ĉio restis paca – por hodiaŭ. Ni atendis ankoraŭ unu horon kaj poste la renkontiĝo estis finita. Ni veturigis ĉiujn hejmen jam malfrue, sed sen iu incidento.

Alian tagon mi ne havis specialan taskon kaj restis en la oficejo kaj sportejo. Dum tiu tago mi iom observis nian ĉefon Ted. Li estis usonano kaj venis el Alabama. Estas tre malfacile kompreni alilandanojn. La ĉefo Ted uzis kraĉujon simile al ĉinoj. Por tio li prenis iun malplenan boteleton kaj ofte sputis en ĝin. Por mi tio estas tute nekomprenebla kutimo. Iu germano en mia taĉmento diris al mi, ke li iam volis trinki el botelo de nia ĉefo, sed en la lasta sekundo li estis avertita de iu kanadano.



„Ponto Kafejo“, situanta en Mitrovica post la ĉefa ponto en la serba parto; tie KFOR jam ofte arestis serbaj krimuloj kaj post tio ofte sekvis demonstracioj.

Petrov Maksim [Aksu, Kazahio]

Portempa loĝloko

Homo dum tuta sia vivo konstruas urbon. Ĉiuj domoj en la urbo estas tiuj, en kiuj li iam loĝis. Naskiĝdomo, infanĝardeno, lernejo, kiujn li vizitadis dum lia vivo — ĉio aperas sur malplena spaco ekde la unuaj tagoj. Tiuj ĉi memorindaj lokoj restas ekzisti, ne malnoviĝante en la memoro kaj konservante la antaŭan aspekton. Kelkfoje ple-naĝinta mastro venas tien por admiri infanan freŝecon kaj por mallonga tempo vivi inter karaj por lia koro aĵoj. Tamen ilia longdaŭro dependas de la memorkonstanteco de la mastro. Se ilin longe ne viziti, memorindaj pejzaĝoj paliĝas kaj forvaporigigas en aero. Forgeso detruas la domojn, liberigante lokojn por novaj rememoroj.

Plue la urbo pligrandiĝas, povas aperi montoj, marbordo, arbaro, dezerto — pejzaĝoj, inter kiuj vivadis la homo, iĝas ingrediencoj de la urbo. Ĉielo super ĝi konsistas el diversaj pecoj — klare bluaj, nubaj, stelplenaj, fulmotondraj. Samtiel vetero en ties diversaj distriktoj estas malsama.

Kelkfoje super la horizonto aperas miraĝoj — "aeraj kasteloj". Sed vanaj restas provoj de la homo konstruadi laŭ idealaj ekzemploj, li malofte sukcesas tion plengrade: aŭ grundo por fundamento ne estas taŭga, aŭ kvalito de konstrumaterialoj ne estas alta, aŭ ties kvanto ne estas sufiĉa.

Frue aŭ malfrue homo devas transloĝiĝi. Tia estas lia destino. Kien — scias neni. Unuaj diras, ke en pli komfortan loĝejon kun ĉio necesa, la duaj — ke en la rubejon por mizereco kaj trompado, la triaj — ke en la senliman spacon, kie malekzistas tero kaj ĉielo, lumo kaj malhelo. Sed tiel aŭ aliel, transloĝiĝas ĉiu, dezirante tion ĉi aŭ male. Pakajojn oni kun si ne prenas.

La homo lasas la urbon per aviadilo. Kiam li forflugas, la aviadilo dum ekflugo faras fortegan turnoblovon, kiu forbalaas la urbon, detruante ĝin ĝis la lasta ŝtono. Kiam la vento ĉesas, sur ĝia loko restas nur neuzebla tereno — la sama, kia estis antaŭe.



Prokopjev Dmitriĵ [Ĉaŝi, Rusio]

Popov Nikolao [Miĉurinsk, Rusio]

Kredo

Nokto. Estas griza ĉielo kaj neĝa malhelo. La neĝa uragano furiozas en senlima stepo, penetras ĝis ostoj, forŝiras la vestojn de l' lacaj pilgrimantoj.

... Tra la kampo silente iras la homoj. Ili estas nemultaj, tre nemultaj. La plej fortaj el ili tratabas la vojon antaŭen en la profunda neĝo.

Iras kaj iras la homoj en la neĝo, spite la malvarma vento, spite la malespera sorto. Kaj paŝo post paŝo restas ĉe la homoj malplimulte da fido al tiuj el ili, kiuj tratabas la vojon, malplimulte da kredo en prosperon de la komuna afero. Jam iuj ekplendis en la malantaŭaj vicoj: "Ni ne plu povas iri!"

— Ni ne devas stari! - ekkriis la irantoj antaŭe. — Vidu, kiom aĉa estas la vetero. La malicaj fortoj atendas nian falon, atendas, kiam ni perdos la kredon! Sed jam proksimas la lumo kaj varmo!

Sed nenia lumo kaj nenia varmo estis. La irantoj antaŭe promesis al la homoj fajron kaj varmon, ĉar ili mem timis resti en la malplimulto.

Kaj jen fine — kio videblas kaj aŭdeblas? La homoj penas aŭskulti... Tra la hurlado de neĝa blovado al ili ŝajnas la voĉoj, hunda bojo kaj odoro de fumo.

— Dio mia! Ĉu tiom proksime estas loĝejo, fajro kaj nutraĵoj? - demandas la homoj unu la alian.

— Do, ni ja diris, ke ni atingos la celon! - denove ekkriis tiuj el la antaŭaj vicoj. — Ni sciis, ni kredis!

Kaj, ho, miraklo! Evidentiĝis, ke restis fari nur unu paŝon por trafi en la urbon, plen-plenan de homoj kaj lumoj. Tie, en la urbo, ne blovis la malica vento. Tie estis varmo kaj brilis la vivo!

En la okuloj de multaj alvenintoj aperis larmoj. Tio estis larmoj de feliĉo kaj amo, larmoj de espero kaj kredo.

Leksina Ludmila

[Sudĵa, Rusio]

Besta alfabeto

Datŭrigo. Komenco

(A,B,C) en la numero 8-2001

Ĉ, D, E, F en 1-2002.; G, Ĝ, H, I en 2-2002

K, L, M, N en 3-2002; O, P en 4-2002

R

Reptilio ruza rampas.
Rato rizon rongas.
Reptilio raton rabas,
Remaĉadon rompas.

S

Saltanta sciurino,
Severa serpentino
Salutas sudan struton.
Sed struto senanima,
Sed struto senkompata
Silentas senpasie...

Ŝ

Ŝakalo ŝafon ŝiras,
Ŝakalo ŝafon ŝatas.
Ŝimpanzo
ŝinkon
ŝmacas.

T

Tapiro tretas testudidon.
Turmentas tigron tarantuloj.
Teruras tetro tetraidon.
Triumfas tie torturuloj!

Por gajaj instruantoj

Klare kaj facile ilustru la uzadon de la "io"- derivaĵoj
en Esperanto

rekomendas **Martin Ginette** [Saulxures/Moselotte, Francio]

finiĝo **O** = objekto, afero

pri objekto

io asertas
sed ne precize



pri objektoj

ĉio prenas
la tuton



pri objekto


tio montras

Tio:
prezentas
al mi.



pri objekto

nenio
negativus



pri objekto

ĉio demandas



Ŝercoj pri scioj kaj studentoj

Studentoj, memoru:
ĉio dirita de vi dum la
ekzameno povos esti
uzata kontarŭ VI!

*

Iuj scioj estas
neatingeblaj por la
homa menso, sed ni
ne scias — kiuj.

Leciono en
universitato — tio
estas procedo de
transiro de la
skribaĵoj de
profesoro en la
kajerojn de
studentoj, sen trafi
en ies cerbon.

kolektis **Andrej Frolov** [Ĉelabinsk, Rusio]

kaj scivolemaj lernantoj

Vŝivceva Tatjana [Miass, Rusio]

Daŭrigo. Komenco en "K"-2-02

Tatjana Vŝivceva prezentas por via atento "Gajan Gramatikon" - la famajn "16 regulojn" en humura aspekto. Ni rekomendas tiujn versetojn por kursgvidantoj kaj komencantoj.

Gaja Gramatiko

11. Participoj, gerundioj
Estas ankaŭ ja pasivaj.

-it-

Libron mi tralegis sprite,
Nun ĝi estas jam legita.
Kiam legas mi la tekston,
Tiam ĝi legata estas.

-at-

Se mi planas legi ion,
Do legota estas tio.

-ot-

Pri l' pasivaj gerundioj
Provu mem kun helpo dia
Trove la ekzemplojn bonajn —
Trafajn, verajn kaj belsonajn.

(Gerundio — deklinaciebla infinitivo, rigardata kiel substantiva formo de verbo — *la red.*)

12. Difinita artikolo
"La" uzeblas en parolo.

-la-

Centro de la urb' konkreta.
Jam menciis ni la kreton.
La broŝuro (tiu) bonas,
Kaj la nova kanto sonas.

13. Se la "-o" - finaj' forestas —
Apostrof' en vorto estas.
Ankaŭ "L" sen "a" ne sonas —
Apostrofon ĝi bezonas.

’

De l' anim' dolor' despera.
De l' amik' leter' sincera.
Dank'al tiu apostrofo
Por ĉiam' belsonos strofo.

fino en la 6-a kajero de "K"-2002

Prelegu

Konsiloj por la prelegantoj de Esperanto-
lecioj, kiujn kolektis **Bill Thome**,
(ŝajnas el la propra sperto?)

— Kiam vi prelegas, provu ne gestadi.
Superflujaj movoj de la manoj distras
atenton for de la temo kaj psikologie
signifas, ke mankas al vi memfido.

*

— Trovu amikan vizaĝon en la
aŭditorio, kaj vi ne sentos vin sola.

*

— Ne balbutu. Vi aspektos kiel idioto
kaj ĉagrenigos viajn aŭskultantojn.

*

— Ne citu datojn, krome, se iu
demandos vin pri tio. Kiam vi diros:
"Ho, jes, mi memoras je la tria de
marto 1906 pluvis!", — vi certe
perdos atenton de aŭskultantoj.



Emilio Cezar Monreal Soler [Havano, Kubo]

Neelpensitaj historioj

Okazintaj *al* aŭ tradukitaj *de* niaj legantoj



Kornjina Anna
[Barnaul, Rusio]

Ne malfru al la lecionoj

Elrusigis:

Vladimir Opletajev [Surgut, Rusio]

Frumatene en lernejo la unua leciono estas pri biologio. Instruisto vokas la nomojn de gelernantoj. La duonvekiĝintaj lernantoj apatie reeĥas. Subite brue malfermiĝas la pordo kaj ĉe la sojlo aperas iu malgranda estulo kun la larĝe malfermitaj okuloj, taŭzigitaj haroj kaj kun la jaketo vestita per subŝtofo eksteren.

La instruisto turnas sin al la malfrua veninto kaj demandas lin severe: kiu estas via nomo? La alkurinta knabo, forte spirante pro la anhelado, ne povas eĉ unu vorton elparoli. La pensoj miksiĝas en lia kapo. Tamen li konjektas lin demandi, sed ne komprenas esencon de la demando. Tiumomente li decidas, ke la demando plejcerte koncernas la materialon, studitan en la pasinta leciono, kaj per alta voĉo, iom balbutante, li kuraĝe kaj jubile deklaras: *kr-krokodilo...*

Kiel mi scias, Leĉjo ne povas jam de post tri jaroj seniĝi je sia nova moknomo.

Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]

666

Eble ne ĉiuj scias, ke la sumo de ĉiuj numeroj de la rado de ruleto egalas al 666. Vere diabla inventaĵo!

Eltrovis kaj esperantigis **Tolobov Andrej**,
[Buzino, Rusio]

Sprita respondo

La tridekaj jaroj de la pasinta jarcento. La fama sovetia poeto Vladimir Majakovskij elpaŝas en la disputo pri la proleta internaciismo:

— Inter la rusoj mi sentas min ruso, inter la kartveloj mi sentas min kartvelo...

Demando el la halo:

— Kaj inter la idiotoj?

— Kaj inter la idiotoj mi estas por la unua fojo, - respondis Majakovskij.

Panjo, sendu monon!

Foje per televido oni montris el Ĉeĥio hokean ludon inter la ĉeĥa kaj kanada teamoj. Sur la ekrano kelkfoje aperis la vigla knabeto, kun la vizaĝo, kolorigita en la kolorojn de la ĉeĥia standardo, kiu saltis inter la spektantoj kaj swingis la ŝildon kun la skribaĵoj en la ĉeĥa lingvo.

Ĉiuj internaciaj televidspektantoj evidente pensis, ke sur la ŝildo estas skribitaj salutvortoj por la ĉeĥa teamo. Sed mi ja komprenas la ĉeĥan! Sur la ŝildo la sprita knabo skribis: "Panjo, sendu al mi monon!"

En taksio

Foje mi veturis en taksio (mikrobuso-taksio). Apud la ŝoforo sidis viro kaj demandis lin: "Ĉu mi atingos per tiu ĉi taksio la straton de Lenin?"


La ŝoforo respondis: "Jes". La virino, kiu sidis post mi ankaŭ konfirmis: "Jes".

La viro, duonturniĝinte, diris al la virino: "Dankon". La virino denove diris "Jes". La viro jam pli laŭte same duonturniĝinte, ne rigardante al la virino: "Dankon". La virino laŭte diras: "Do, ni renkontiĝos vespere kaj trovos, pri kio okupi sin..." La viro jam rimarkeble paniketis. Li turniĝas kaj rigardas al tiu virino. Kaj ŝi daŭrigas babili per la portebla telefono.



Bill Thorne [Londono, Britio]

Tempo kaj homoj



Kornjuhina Anna [Barnaul, Rusio]

El la portugala lingvo esperanten tradukis
Jader Rodrigues da Silva [Belo Horizonte, Brazilo]

Tempo kaj oportuno

El la libro "Viglu kaj preĝu" de Frato Josefo.

Tempo estas la plej saĝa kaj la plej justa el la juĝistoj.

Al ĉiuj ĝi ofertas la samajn oportunojn de ascendo.

Malrapide ĝi evidentigas la plej kaŝitajn intencojn de ĉiuj homoj.

*

Ne malatentu la valoron de la minutoj.

*

Perdita tempo estas senprofita benaĵo.

*

La hodiaŭa tago estas via plej bona oportuno de konkero.

Nun estas via momento brili kaj prepari trankvilan morgaŭon.

*

Ne krucigu viajn brakojn, atendante la okazaĵojn.

Okazigu viajn feliĉecon, ĝojon kaj pacon.

*

Tempo estas simila al grundo: ĉiam ĝi redonas tion, kion ĝi ricevas, fruktodonante laŭ la semado.

Scienc-fikcia rakonto
 originale verkita en Esperanto

Stephen Morgana
 [Brockport, Usono]

La postkuro

Maldekstren... William funkciigas rezervan raketan impulsilon de sia kosmoŝipo por dudek sekundoj.

Sur la vid-ekrano kreskas la konturoj de la stelŝipo de Johnson. Ĝi nun situas je kvardek gradoj flanke de la centro de la ekranu kaj restas preter la celilo. Por kapti la ŝipon de Johnson William donas ankoraŭ unu raketan impulsilon por kvin sekundoj. La ŝipo de Johnson proksimiĝas, ĝi jam videblas en la antaŭa kajuta fenestro. William klare vidas la manovrojn de Johnson — dekstren, maldekstren, supren, malsupren, kiujn li faras por eviti de la celilo de William.

— "Evidente Johnson pretigas distordilojn de sia kosmoŝipo. Jes!"—La generita de la ŝipo de Johnson distorda kampo trafis la cerbon de William. Li ekflaris konatan malsanan dolĉan odoron.


— Li atakis min! - perdante sinsenton ekkriis William kaj sukcesis enŝalti la unuan kaj la duan zonojn de la sekur-sistemo.

— Kien li malaperis? Dekstren? — William ne plu vidas la ŝipon de Johnson sur la vid-ekrano kaj serĉas ĝin per sensiloj de la ircela komputilo. — "Jen, mi retrovis ĝin!" - entuziasmiĝas William. — "Mi bezonas almenaŭ tri sekundojn! Mi plonĝu je tridek gradoj malsupren. Restas du sekundoj... Mi manovru maldekstren. Unu sekundo!.. Dekstren! Iom supren... Jen estas la celo!"

William premas la butonon de la distordilo. La ŝipo de Johnson disaperas en blindiga ekbrilo.

... Nenio videblas sur la videkrano. Nenion montras la sensiloj-aparatoj. Nenio videblas en la kajuta fenestro.

"Mi venis la unua. Johnson ne estas plu problemo?.." sukcesas ekpensi William.



Bill Thorne [Londono, Britio]

Saĝulo ŝatas lerni, stultulo - instrui

AFORISMOJ

Jakovleva Elena
[Arĥangelsk, Rusio]

El du kverelantoj kulpas la pli saĝa.

Jo. Goete

Neniu komencos rakonti klaĉojn, se neniu aŭskultas...

M. Ditrih

Arto esti saĝa konsistas el scipovo scii, al kio ne necesas turni atenton.

W. Geims

La plej bona maniero amuzi homojn estas sidi kaj aŭskulti iliajn rakontojn.

H. Kin

Tute neklera homo povas eble prirabi la varan vagonon, sed kiu finis universitaton povas forŝteli la tutan fervojon.

Teodoro Ruzvelt

Nelegantoj ne havas avantaĝojn antaŭ la analfabetuloj.

NN

El la lecionoj de iuj pedagogoj ni perceptas nur la regulon sidi rekte.

V. Katajinskij

Zujeva Margarita
[Moskvo, Rusio]

Venkinte fieron, homo iĝas agrabla.

Venkinte koleron, li iĝas gaja.

Superinte pasion, li iĝas prosperanta.

Superinte avidecon, li iĝas feliĉa.

Popola araba saĝo.


Stultulo kaj ombro

Unu stultulo komencis postkuri sian ombron por kapti ĝin. Kuris, kuris, sed ĉio vane.

La preterpasanto kompatitis la stultulon kaj diris al li: "Se vi volas kapti sian ombron, necesas nur kliniĝi."

Tiel kelkaj homoj vivas en serĉado de feliĉo kaj ne rimarkas valoron de tio, kion ili havas.

rerakonto de la fablo de Hemnizer



Kornjuĥina Anna [Barnaul, Rusio]

Ludoviko Zamenhof

Proverboj pri studado kaj lernado

Kio estas lernita, ne estas perdita.

*

Kiu ripetas abunde, lernas plej funde.

*

Lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon.

*

Por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno.

*

Lernado sen fruktoj ne restas.

*

Lernu juna, por esti saĝa maljuna.

*

Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo.

*

Ripetado estas plej bona lernado.

*

Vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu.

*

Por malsaĝulo bastono - por saĝulo leciono.

*

Li taŭgas nek por studo, nek por ludo.

*

Lerneja sekreto ne iru al gazeto.

*

Lecionoj al profesoro estas vana laboro.

**Yves Bruso**

[Douarnenez, Francio]

La kuracisto anoncas al sia pacientino:

- La bilanco ne estas tre bona: migreno, orel-zumado, hipertensio, reŭmatismo... Kiomaĝa vi estas?
- Mi estas kvardekjara.
- Hml.. Kaj krome, totala memor-perdo.

Gusjeva Nataŝa,

[Pervomajskoje, Rusio]

- Sinjoro, kiom da kruĉoj de biero vi trinkas kutime dum tago?
- Kvar.
- Sed mi ja permesis al vi nur du!
- Sed ankaŭ terapeŭto permesis du...

- La ĉefo eniras en sian oficejon kaj vidas la oficistojn fumi.
- Mi ja ordonis ne fumi dum la laboro!
- Sed kiu laboras? - respondas tiuj.

En la vendejo.

- Stranga kombino de varoj estas en via vendejo. Nur saksofonoj kaj revolveroj.
- Tute ne stranga. Kiam iu aĉetas saksofonon, baldaŭ venas lia najbaro kaj aĉetas revolveron.

FiŝkaptadoKolektis laŭteme kaj esperantigis **Kuznecov Oleg** [Suĥoje, Rusio]


Parolas du najbarinoj:

- Via edzo tiom maldikiĝis! Kiel li atingis tion?
- Li ĉiutage iras fiŝkaptadi
- Ĉu dank'al tio li maldikiĝis?
- Jes. Li manĝas nur tion, kion kaptas.

Du fiŝkaptistoj kaptas fiŝojn el la sama boato. Unu el ili eltiradas fiŝon post fiŝo, la alia eĉ unu fiŝeton ne kaptis. Li demandas la unuan:

- Petro, vi je kio fiŝkaptas?
 - Je vermoj.
 - Ankaŭ mi je vermoj.
 - Kaj kian hokon vi uzas?
 - La ordinaran.
 - Ankaŭ mi la ordinaran.
 - Kaj la fadeno ĉe vi estas kia?
 - 0,3 de milimetro.
 - Ankaŭ mi uzas tian.
- Tiam la bonfarta fiŝkaptisto diras:
- Sed vi, kiam fiŝkaptas, pri kio pensas?
 - Pri virinoj.
 - Sed mi — pri fiŝoj!

Organizis en la lago karpoo gangsteran bandon el tri karasoj. Kaj atakis ili ezokon. La ezoko formanĝis ilin ĉiujn. Ĝi ne sciis, ke ili estas gangsteroj.



Naumoviĉ Svetlana [Tjumeno, Rusio]

Naĝas ŝarko en la grandega akvario, rigardas tra la vitro al la vizitantoj kaj malice pensas: "Via feliĉo, karaj, ke mi estas post la baro, sed ne en maro".

Kuŝas sur la telero fiŝo, farĉita per kaĉo kaj rezonas: — Pro ĉio necesas pagi. Antaŭe mi estis malsata, sed viva. Nun estas sata, sed morta. Ho, mankas feliĉo en vivo!

- Ĉu vi scias, mia kara, kial la fiŝoj ne parolas?
- Ne, mi ne scias
- Vi ŝovu la kapon en la akvon kaj provu ion diri!

Anekdotoj el familia vivo

- Ĉu vi ĉiam konsentas kun via edzino?
- Tute ne ĉiam.
- Kaj kiel ŝi al tio rilatas?
- Ŝi eĉ ne konjektas pri tio.

- Kiu en via familio estas la ĉefa, vi aŭ via edzo?
- Certe la edzo. Li estas la ĉefa plenumanto de ĉiuj miaj ordonoj.

El ĉiuj parencoj de mia edzino plej multe plaĉas al mi mi mem.

Por konservi la pacon en familio bezonatas toleremo, amo, komprenemo kaj nemalpli ol du televidiloj.

Problemo, kie trovi monon ligas la geedzojn pli forte ol la problemo kiel ĝin elspezi.



Ŝulepov Vladimir [Verhoturje, Rusio]



Kion vi scias pri Zamenhof?

Decembre la esperantistoj tradicie festas la naskiĝtagon de nia Majstro, kaj nia testo estas dediĉita al li. Ni atendas viajn respondojn rete kaj papere. Sufiĉas indiki numeron de la demando kun la numero de via respondo.

Ekzemple 1-1, 2-2, ktp...

1. Zamenhof naskiĝis: la

- 1 — 15-an de decembro 1887
- 2 — 26-an de julio 1887
- 3 — 15-an de decembro 1859
- 4 — 15-an de decembro 1878
- 5 — 1-an de aprilo 2002

2. Zamenhof naskiĝis en:

- 1 — Rusio
- 2 — Rusia Imperio
- 3 — Pollando
- 4 — Belorusio
- 5 — Esperantio

2. Nomo de la patro de L. Zamenhof estis:

- 1 — Lazaro
- 2 — Ludoviko
- 3 — Marko
- 4 — Leopoldo
- 5 — Moseo

4. La aŭtoro de la internacia lingvo estis:

- 1 — Doktoro de sciencoj
- 2 — Infankuracisto
- 3 — Policisto
- 4 — Okulisto
- 5 — Juristo

5. L. Zamenhof kreis:

- 1 — Volapŭko'n
- 2 — Interlingvo'n
- 3 — La internacian lingvon
- 4 — La gramatikon de ĉina lingvo
- 5 — La morsan alfabeton

6. De senfinaj modifoj Esperanton savis:

- 1 — Netuŝebla "Fundamento..."
- 2 — Nefalanta Tegmento
- 3 — Fina Venko
- 4 — Nova Sento
- 5 — Honora Prezidanto

7. La unua lernolibro de Esperanto restis en historio de la lingvo sub nomo:

- 1 — Plena Lernolibro
- 2 — La Unua Libro
- 3 — La Unua Lernolibro
- 4 — Plena Gramatiko
- 5 — Lingvo Internacia

8. Zamenhof estis aŭtoro de la verko:

- 1 — Vintra fabelo
- 2 — La Espero
- 3 — Estas mi esperantisto
- 4 — Esperantisto, ekesto kaj malapero
- 5 — Hamleto

9. Kiu el tiuj verkoj ne estis en la Unua Libro?

- 1 — Mia penso
- 2 — Patro nia
- 3 — Ho mia kor
- 4 — La Espero
- 5 — Ĉiuj estis

10. La unua E-gazeto, en kiu kunlaboris Zamenhof:

- 1 — La Gazeto
- 2 — La Esperantisto
- 3 — La Ondo de Esperanto
- 4 — Esperanto
- 5 — Komencanto

11. Dum la vivo de Zamenhof jam funkciis:

- 1 — Sennacica Asocio Tutmonda
- 2 — Internacia Ligo de Esperantistoj - Instruistoj
- 3 — Pasporta Servo
- 4 — Universala Esperanto-Asocio
- 5 — Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

12. Zamenhof volis, ke oni nomu lin ... de la lingvo.

- 1 — aŭtoro
- 2 — fondinto
- 3 — iniciatoro
- 4 — kreinto
- 5 — redaktoro



RIMARO

Bill Thorne

ELO

akvarelo
 anĝelo
 barelo
 bordelo
 botelo
 ĉapelo
 celo
 citadelo
 duelo
 fabelo
 felo
 funelo
 ĝemelo
 hotelo
 juvelo
 kamelo
 kandelo
 kantarelo
 karamelo
 karavelo
 kartvelo
 karuselo
 kelo
 kitelo
 kolonelo
 kverelo
 mantelo
 martelo
 mekzelo
 melo
 menestrela
 mielo
 modelo
 muzelo
 nivelo
 novelo
 ombrelo
 orelo
 panelo
 pudelo
 relo
 ribelo
 ŝelo
 sigelo
 sitelo
 stelo
 tunelo
 velo

Respondoj al la krucnigmo en "K"-4. Horizontale: 1. Mezvojo. 5. Dum. 6. Boto. 7. Finota. 9. Orta. 10. Mon'. 12. Hufo. 13. Ilo. 14. Omleto. 15. Pura. 16. Glata. 17. Tria.

Vertikale: 1. Modifi. 2. Zamenhof. 3. Orbito. 4. Ofte. 8. Arkitekto. 10. Mur'. 11. Normala. 14. Orgio. 15. Poto.

Invitoj kaj informoj

Universala Esperanto-Asocio

(R)estu membro de la E-komunumo!

Mi volas rediri al vi, kial indas esti kaj resti membro de la Esperanto-komunumo. La samon pli-malpli mi jam diris pasintjare, kaj mi restas nun samopinianta. Esence al la ĉiama demando: "Kial finfine mi devus aliĝi al la loka Esperanto-klubo, al la nacia landa asocio, al la asocio de mia fako aŭ hobia, al Universala Esperanto-Asocio?" mi kutimas respondi, ke ekzistas almenaŭ du kialoj:

1) La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio; mallonge dirite, ili laboras por lingva demokratio. Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al monda, nacia aŭ faka asocio (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda Esperanto-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj kiu provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

2) Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj, koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj. Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj faras des pli nature, estante daŭre informataj per siaj asociaj ligoj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝ-ebloj je sia dispono. Kaj se vi apartenas al la komunumo de tiuj, kiuj normale ŝaltas sian komputilon antaŭ la matenmanĝo, vi trovos (aŭ jam trovis), ke esperantistoj ĉeestas pli kaj pli en la tutmonda reto kaj serĉas kontaktojn kun similaj esperantistoj. La avantaĝoj de asocia membreco estas similaj ankaŭ ĉi-kaze. Ekzistas diversaj diskutgrupoj por UEA-membroj, ekzemple, kaj nuntempe ankaŭ eksperimenta eblo ricevi la revuon Esperanto per Interreto en komputila formato.

Do estas grave, ke vi klopodu aliĝi al Esperanto-organizaĵoj je ĉiuj niveloj (loka, landa, faka aŭ internacia). Ni kompreneble invitas vin aliĝi aŭ re-aliĝi al UEA, sed ankaŭ se vi aliĝas nur al faka asocio aŭ al via loka klubo, tio jam estas io bona; kaj se vi aliĝas ankaŭ al via landa asocio, tio estas io ankoraŭ pli bona, ktp.

UEA pretas ĉiukaze sendi al aranĝantoj de naciaj aŭ lokaj renkontiĝoj stokon da revuoj de UEA de la pasinta jaro kune kun cirkuleroj por disdonado al la partoprenantoj - oni devas tiurilate nur peti la Centran Oficejon. La celo de nia kampanjo estas "vastigi la komunumon", tio estas vastigi la nombron de organizitaj kaj interligitaj esperantistoj je ĉiu nivelo. Nia ĉefa celo estas ke la membroj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj pliiĝu kaj estu en kontakto inter si. Oni vastigas la komunumon ĉefe per informado pri Esperanto kaj instruado de Esperanto, sed ankaŭ tio estas senefika en la longa daŭro, se la parolantoj de Esperanto ne poste iel restas kune. Ni restas je via dispono por kunlabori kun vi pri tiu ĉi celo.

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA



<renato.corsetti@co.uea.org> Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
tel. +31 10 436 1044; fakso +31 10 436 1751;
retpoŝto: <uea@uea.org>; TTT: <http://www.uea.org>

Karaj instruistoj kaj grupestroj!

Mi intencas fari liston de esperantaj grupoj kiuj deziras korespondi grupe, ĝenerale sub la adreso de instruisto, grupestro, lernejo aŭ klubo. Mi jam havas liston de individuaj korespondantoj. La kompleta listo de pli ol 200 korespondemuloj de pli ol 50 landoj estas en la paĝo de la "Esperanto Koresponda Servo"

<http://members.aol.com/enrike/ekspeto.htm>

La duan vendredon de ĉiu monato mi aŝifas la 3-monatan liston en la novaĵgrupo "soc.culture.esperanto". Ĉi tiu aŝifado jam okazis dum 12 jaroj. Samtempe mi sendas la liston al kelkaj homoj kiuj publikigas aŭ aŝifas la tutan liston, aŭ parton de la listo en kelkaj publikaĵoj, retaj kaj paperaj. Oni povas ricevi tiun liston de "Abonu.com" sub "hobioj.kor" (korespondado) Se vi aŭ via grupo deziras esti en la listo, bonvolu sendi al mi informojn — kion vi volas scii pri iu grupo, kaj donu al mi informojn pri via grupo.

Minimume la listo bezonas la nomon de la grupestro, se estas lernejo aŭ klubo, ĝian nomon, eble ĝian strat-adreson, kaj nepre la urbon kaj landon. La listo ankaŭ bezonas ret-adreson, aŭ kompletan strat-adreson se oni celas al paper-korespondado. Bonvolu diri kiaj homoj formas la grupon. Mi kredas ke instruado de Esperanto ne sufiĉas. La lernantoj devas uzi Esperanton, aliel, ili forgesos pri Esperanto, aŭ pensos pri Esperanto kiel pri perdita tempo. Korespondado estas la plej taŭga maniero por komenci la uzadon de nia lingvo. "Se ni ricevus leterojn (retpoŝte aŭ paper-poŝte) el aliaj landoj, tio montrus al la aliaj instruistoj kaj lernantoj ke Esperanto funkcias!"

Salutas vin, Enrique Albany,
NY, Usono



Dalmatova
Daŝa
[Jelec,
Rusio]

Anoncetoj

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 15-jara fraŭlo. Mi serĉas plum-amikojn ĉar mi bezonas praktiki la lingvon. Mi ŝatus korespondi papere.

Pauxlo de Souza
Rua Dom Nery, 324 -centro
Pouso Alegre, M.G.
CEP: 37.550-000

Brazilo

Mi estas 20 jara studento kaj progresanto. Interesoj: lingvoj, matematiko, kino, literaturo (rusa kaj esperanta) kaj klasika muziko. Mi serĉas korespondantojn ĉefe el Azio, Afriko, kaj Mez-Oriento. Mi loĝis en Rusio kaj amas ĝin, mi naskiĝis kaj nun loĝas en Usono.

Kristoforo Alano
TESSONE
Knox College Box 1504
2 East South Street
Galesburg, IL 61401

USA

tessone @ polyglut.net

55-jara eksinĝenierino dez. kor. pri ĝardeno, abeloj, bestoj, sanigantaj sistemoj, neordinaraj eventoj. Kolektas alilandajn nomojn de bestoj.

Ludmila Leksina
Lugovaja, 2a, Sudĵa,
Gooĉarovka, Kurskaja obl.,
307800, **Rusio**

Mi estas 15 jara fraŭlino, studentino, komencanto. Int.: meteorologio, muziko, pianludo, dancoj, libroj, lingvoj.

Eva Papelková
Amforová 7/1925
155 00 Praha 5, Prague,
Czech Republic
evapop@seznam.cz

Informoj

Korespondu!



Oazo de esperanto

La plej Amikeca Loko en la Mondo.
Mi estas civitano de la Universo kiel Vi. Mia Mondo
Estas Via Mondo. Mia Hejmo Estas Via hejmo.
La Universala Domo de Amo.

Mayor J. Tilman Williams,
✉ 11241 Chapman Ave., Garden Grove, CA. 92840
USA

✉ oazodeesperanto@Juno.com ☎ (714)750-4333
2 Miles Southwest of Disneyland.

Se vi venos al mi vi estos bonvena!

18-jara esperantisto deziras korespondi kun ĉefoj esperante kaj ĉefe.

Aleksandr Derjugin
Kavkazskaja, 13-15
Saratov
410049
Rusio

Internacia Koresponda Adresaro

Vi povas korespondi tutmonde. La adreslisto enhavas pli ol 200 adresojn el pli ol 40 landoj. Sendu vian adreson kun la temoj - ĝi aperos senpage. Abonu la liston kontraŭ 2 IRK. Redaktas: *Lazaro Azavy*
Eldonas: *Cezar Monreal*

Apartado Postal 3026
Habana 13, CP-11300
La Habana,

Kubo

Mi estas 29 jara, komencanto. Mi estas komputilisto sed studas por esti fajrestingisto. Interesoj: kostumoj el aliaj landoj. Mi serĉas komencantojn ĉefe el Azio, sed ankaŭ el la tuta mondo. *Tenerife* estas la plej granda insulo el Kanaria insularo.

Wladimir COVAS
La Cruz str., 17
Tenerife Kanaria Insularo
38120

Hispanio

Wladimir@latinmail.com

KOMENCANTO

2003

16 paĝoj
kolora kovrilo
famaj esperantistoj
historio de E-literaturo
gramatiko serioze kaj ŝerce
neelpensitaj historioj
amuzaj rakontoj
proverboj, enigmoj
aforismoj, anekdotoj
anoncetoj, adresoj
multaj multaj bildoj

38 jara fraŭlo serĉas korespondantinojn-fraŭlinojn kiu havas inter 25 kaj 40 jarojn.

Larry Lowe
83222-079
P.O. Box 26020
Beaumont, Texas,
77720—6020

USA

Bonvolu noti novan retroŝtan adreson de KOMENCANTO

komencanto@r66.ru

vial mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj !

